ERNESTO NAZARETH

Reĝo de la "*ŜORO*"

(muzika brazila formo, antaŭe konata kiel *BRAZILA TANGO*)

Ernesto Júlio de Nazareth – naskiĝis en la urbo Rio-de-Ĵanejro, en loko nomata "Morro do Nheco", hodiaŭ konata kiel "Cidade Nova" la 20an de marto de la jaro 1863. Filo de Carolina da Cunha Nazareth kaj Vasco Loureiro da Silva Nazareth. Li lernis en la lernejo "***Belmonte***" kaj havis tie, kiel kolego, unu el la plej grandaj Brazilaj beletristaj verkistoj ***Olavo Bilac***.

Lia muzika lernado komencis per lecionoj de piano faritaj hejme, kun sia patrino, kiu siavice lernis tute sola. Kiam lia patrino, Carolina, estis knabino ricevis de siaj gepatroj vertikalan pianon, kaj sur ĝi, ĉiutage, ŝi praktikis ĝis atingi bonegan gradon de perfekteco, kiu vokis la atenton de pluraj kleruloj kaj profesoroj, ĉar ŝi faris plurajn muzikajn prezentadojn.

Ernesto, ĉiam estis en kontakto kun la bona muziko; Bach (Baĥ), Beethoven (Bethofen), Mozart kaj Chopin (Ŝopan), kune kun polkoj, valsoj, kaj "modinhas", kiuj estis tre oftaj en noktaj familiaraj

renkontiĝoj. Tre juna, li havis la unuajn lecionojn de muziko kaj precipe de piano, kun sia patrino, Carolina da Cunha Nazareth. Ŝi estis tre gaja kaj milda en la rilatoj kun la filo-lernanto, kontraste kun la konservativa kaj severa sinteno de lia patro, kiu estis simpla laboristo ĉe Doganejo. Sed bedaŭrinde lia hejma lernado estis tre mallongedaŭra. Lia patrino mortis en la jaro 1873 post tre fulma malsano. Ŝi eĉ faris publikan prezentadon 15 tagojn antaŭ sia forpaso. La morto de lia patrino estis por Ernesto duobla perdo, ĉar samtempe li perdis patrinon kaj profesorinon. Li estis nur dekjara infano.

Pri ĉi-tiu foto oni sciis jenon: li estis 4 jara infano kaj oni vestis lin kun liaj plej bonaj vestaĵoj kaj kunportis lin antaŭ modesta fotisto, kiu loĝis en la strato "***do Sabão***" poste nomata, generalo "***Pedra***".

Aŭdado de: "*Julieta*" valso ludata de Dominique Cornil.

En tiu aĝo Ernesto Júlio jam ludetis kelkajn simplajn melodiojn. Post la forpaso de lia patrino, si daŭrigis la lernadon kun Eduardo Madeira, juna, ne profesia, sed tre lerta pianisto. Dum iom da tempo la patro tute malpermesis al li alproksimiĝi al la piano, sed poste permesis ludi pianon kiam la patro ne estus hejme. Li obeeme faris tion, kaj dum lia patro laboris, li restadis tute sola en la hejmo ludante kaj ludante… tamen la patro post, pli malpli 6 monatoj, nuligis la malpermeson pro tio, ke multaj liaj amikoj komentis pri la bona pianisto kiu estis lia juna filo. Li komencis verki kiam li estis 14 jaraĝa. Ernesto komponis sian unuan muzikon kaj li dediĉis ĝin al Vasco Loureiro da Silva Nazareth, sia patro, eble festante la nuligon de la malpermeso; temis pri, polka-lundu, titolita ***"Você Bem Sabe".***

Eduardo Madeira, kvankam ne plu lia instruisto, ĉiam akompanis lian progresadon, kaj ravita de tiu freŝa verko montris al S-ro Arthur

Napoleão, kiu tuj ĝin eldonis, Li estis la posedanto de la ***"Eldonejo Arthur Napoleão Ltda",*** kaj ankaŭ bonega pianisto. Estis la jaro 1877.

Aŭdado de: "*Carioca*", sama pianistino.

Post kelke da tempo kaj kelkaj aliaj komponaĵoj ("*Gentes! O imposto pegou*"; "*Gracieta*"; kaj komencis uzi la formon "*Tango*", la unua estis "*Cruz, Perigo!*"). Li havis novan instruiston. Estis la fama pianisto Lucien Lambert, kiu kondukis lin al profesiigo kiel pianisto. De tiam li ludis pianon en pluraj lokoj kaj ankaŭ komencis instrui. En 1878 (17 jaraĝa), li partoprenis en komuna ludado kun pluraj famaj tiatempaj muzikistoj, kiel la flutisto Viriato Figueira da Silva. En tiu tempo Ernesto sentis emon partopreni la nomatajn "*Rodas de choro*", kaj motivita de iu polko, de "*Chorão Viriato*" li komponis "*Não Caio Noutra*"; ankaŭ de tiu tempo estas la valso "*O nome dela*".

En 1880 preskaŭ ĉio venis el Europo, tra la dogano pasis ĉiaj aferoj, de muziko ĝis birdaj plumoj, eĉ operkantistoj, por la interpretado de operoj de Rossini, Verdi, Carlos Gomes, Puccini, Mozart, ktp. En la urbo oni kreis multajn lokojn por ludado: estis la Klubo Haydn kaj la Klubo Rossini en la kvartalo "*São Cristóvão*", kie Ernesto faris sian unuan muzikan ludadon antaŭ la publiko en la jaro 1886. La urbo iom post iom alkutimiĝis havi koncerton, preskaŭ ĉiam kun la ĉeesto de famaj Eŭropaj pianistoj: Gottschalk, Arthur Napoleão, Teodoro Ritter, kaj pluraj aliaj…

Ernesto amegis sian edzinon, Teodora Amália de Meireles, kiun hejme li nomis "*Dorica*"; estis por li tre malfacile amindumi kaj edziĝi, ĉar ŝi estis filino de kuracisto kaj profesoro ĉe la fakultato de kuracado. La bopatro estis riĉa kaj fiera kaj vidis la bofilon nur kiel simplan pianludanton. Nazareth alfrontis gravan respondecon. Li havis tre

modestan domon en la kvartalo *"São Cristóvão"*, por ĝia subtenado li devis iri al la hejmoj de lernantinoj por instrui, kaj ludi en muzikvendejoj kaj kinejoj. Liaj verkoj vendiĝis multege, sed la profito iris al la poŝoj de la eldonantoj. Iam li diris, ke li ricevas la pagon de siaj verkoj eldonotajn kiel veran survizaĝan frapon. Al *"Dorica"* li dediĉis la valson "*Dora*". La edziĝo donis siajn fruktojn: 4 filoj, Eulina, Dinis, Maria de Lourdes kaj Ernesto (Ernestinho).

Aŭdado de: "*Carioca*", sama pianistino.

Ernesto Nazareth, havis same kiel Raĥmaninov kaj Liszt, grandajn manojn kaj li sukcesis ludi ampleksajn akordojn, kaj liaj verkoj, por ludado, fariĝas malfacilaj. Li estis tre kreiva; dum sia tuta vivo li verkis iom pli ol 220 verkoj por piano. Liaj verkoj estas multe pli klasikaj ol popularaj kaj estas, precipe, deveno de la verkoj de Chopin,

En Novembro de 1889 venis al Rio Eskadro el la Ĉilia Mararmeo. Tio estis vera festo por la urbo, Tre emocia, Ernesto, omaĝe al tiu okazaĵo komponis "*cuadrilla*" kun la titolo "*Chile-Brasil*" kaj oferdonis ĝin al la oficiroj. En la tre konata lasta Balo de la Imperio en la "*Ilha Fiscal*", kie li ludis, belega junulino elstaris sur la aliaj pro sia eleganteco. Pri ŝi oni scias ke ŝi estis frua vidvino tre riĉa, konata kiel "*Nenê*" kaj fariĝis lia lernantino, al ŝi estis dediĉita la verko kun tiu titolo.

Aŭdado de: "*Tenebroso*" Artur Moreira Lima.

En la jaro 1893 Nazareth komponis la duan verkon laŭ la formo tango; temis pri "*Brejeiro*" konsiderata kiel la ĉefverko inter ili. Pro malfacila financa situacio, Ernesto vendis la rajtojn de tiu verko al la eldonisto "Fontes e Cia." je tre malalta prezo *("50.000 réis")*. Tiu verko estis registrita de la plej grava blovorkestro de Parizo.

Aŭdado de: "*Brejeiro*" Maria Teresa Madeiro, pianistino; Pedro Amorim, bandolino; kaj Oscar Bolão, perkutado.

En la jaro 1898 li faris sian unuan koncerton kiel pianisto kun tuta programo, ludante verkojn de la grandaj komponistoj por piano: Bach,

Mozart, Beethoven, Schubert, sen manki Liszt kaj Chopin. Tio okazis en la Nobla Salono de “*Intendencia de Guerra*”.

Venas la 20-a jarcento kaj la familio Nazareth havis multajn perdojn. Oni scias preskaŭ nenion pri la aliaj familianoj. Tamen oni mencias la geonklojn Julio kaj Ludovina, kiuj volis sendi lin al Eŭropo por perfektiĝo en la pianludado, sed neniam tio realiĝis. Oni ne scias ĉu tiuj onkloj estis patrinaj aŭ patraj fratoj. Ankaŭ oni parolas pri unu frato, sed ĉu pli aĝa? Malpli aĝa? Lia nomo estis Vasco, kiel la patro. Pro tio oni nomis lin “***Vasquinho***”. Li malsaniĝis je tuberkulozo, ĉiuj malesperiĝis, ĉar en tiu tempo ne estis kuracilo por tiu malsano. Kaj ankaŭ mankis mono por sendi lin al speciala loko.

Por kreskigi lian malĝojon Gilberto, konata kiel “Ĝiĝi”, nevo de Ernesto, prenis de sia patro la malsanon. Iom antaŭ la plifortigo de sia malsano, Ĝiĝi petis al la onklo ke li veturigu lin tra la urbo. Ernesto, prenis sentegmentan ĉevalveturilon kaj vizitis plurajn lokojn de la urbo, kie, laŭ kutimo de la epoko, la junuloj renkontiĝis. Li rigardis tiujn lokojn kun febraj okuloj: “*Largo de São Francisco*”, “*Largo da Carioca*” kun siaj kranoj kaj lavistinoj, Teatro “*Lírico*”, “*Convento da Ajuda*”, Publikan Promenejon kaj la ĝardenojn. Kaj fine li diris: kiel bela estas nia urbo! Ŝajnas viaj muzikoj! Sama harmonio, sama sono. Ĝiĝi mortis en la jaro 1903, 15-jaraĝa. Al li, Nazareth dediĉis “*Brejeiro*”.



Aŭdado de: “*Escovado*” Henrique Cazes, *“cavaquinho”*; kaj familio de gitaroj.

En 1907 Oni proponis al Nazareth dungon ĉe “Tesouro Nacional” nun “Ministerio da Fazenda”. Sed li memvole, maltrafis la enirekzamenon. Eĉ tiel, oni aprobis lin, sed li eksiĝis, ĉar por li ludi kaj komponi muzikaĵojn, estas lia vivo.

Kiel antaŭe dirite, pro la subteno de la familio li ludis pianon en muzikvendejoj, kie ĉiam devis esti pianisto por montri, kaj ludi la partiturojn tie vendatajn, ĉar estis nenia alia maniero por aŭdigi la muzikon. Kelkaj junulinoj eniris en la vendejon ne nur por paroli kaj aŭdi profesoron sed ankaŭ por ludi kaj sin montri, precipe ludante lian muzikon; tuj Nazareth kriis dirante: tiel oni ne ludas Nazareth! Krome la pianisto devis ludi en pluraj pianoj por ke la klientoj elektu, laŭ sono kaj bezono, la pianon por aĉeto. En tiu epoko la kinejoj havis salonon por

atendado de la prezentado de la filmo, kaj la pianistoj devis ludi preskaŭ unu horon. Multaj personoj venis frue nur por aŭdi la pianistojn. Unu el tiuj kinejoj estis la konata "*Odeon*" lokita tiam, ĉe stratangulo de la Avenuo "*Rio Branco*" kun la strato "*Sete de Setembro*" Ĉu la sama nuna loko en "*Cinelândia*"? En tiu kinejo ne nur Ernesto Nazareth ludis, sed ankaŭ la malgranda Orkestro de "*Maestro Andreozzi*" kie ludis violonĉelon la granda Heitor Villa-Lobos. Tie Nazareth, frake vestita, interpretis, dum 4 jaroj, verkojn de la plej famaj komponistoj, kaj logike siajn verkojn. Omaĝe al tiu loko, kie li ludis dum la inaŭguro, en 1910 li komponis "*Odeon*".

Aŭdado de "*Odeon*", Dominique Cornil

En 1917 nova malĝojo, Mortis la filino Maria de Lourdes, pro la epidemio konata kiel "*gripe espanhola*". Kelkajn jarojn poste, en 1922, li estis invitita ludi siajn verkojn en la *"Instituto Nacional de Música"* pro indiko de Luciano Gallet. Unu jaron poste (1923), li partoprenis kiel pianisto kaj komponisto de la unua elsendo de la "Rádio M.E.C.", antaŭe "Rádio Sociedade do Rio de Janeiro". Se mi ne eraras, tiu radio estis fondita de Roquete Pinto.

Ernesto Nazareth, estis tre malriĉa kaj krome tre timema. kaj vendis siajn verkojn al la eldonistoj po "dez reis e mel coado" kiel estis dirite tiam. La vendo de la partituro de "Brejeiro" donis tiel multe da mono ke la eldonistoj iom honte faris feston kaj donacis al li pluvombrelon kun ora prenilo, kiu poste estis vendita al iu amiko.

Pri la verko kiun ni tuj aŭdos, estis dirite ke ĝi estas unu el la plej elmontraj verkoj de brazila muziko. Vere ĝi estas tre interesa kreaĵo.

En ĝi oni sentas la malsimilon, rilate al la antaŭaj verkoj prezentitaj, ĉar ĝi estas tre gaja, kaj oni sentas, aŭ pli bone oni ĝuas la brazilan etoson en ĉiuj sonoj, ne gravas kiu ĝin ludas, oni aŭdas plurajn interpretadojn, ĉiujn bonajn, sed tute malsimilajn unu al la aliaj. Kelkaj ludas ĝin celante montri sian kapablon ludi rapide, sed oni en tio ne sentas la animon de Nazareth, ĉar oni sentas preskaŭ nenion, kvankam oni miras la virtuozan teknikon. Pri la titolo, kaj la verko mem, oni diras ke, iam, trovante unu el siaj filoj, sur benketo, prenante el alta breto gujavan marmelado, li ekkriis: apanhei-te cavaquinho! Kaj tuj sidis ĉe la piano kaj komencis imiti la akutan voĉon de sia filo.

Aŭdado de "*Apanhei-te, cavaquinho*", Maria teresa Madeiro, pianistino; Pedro Amorim, bandolino; kaj Oscar Bolão, perkutado.

En 1926 Ernesto Júlio vojaĝis al San-Paŭlo por fari plurajn pianrecitalojn ne nur en la ĉefurbo de la ŝtato sed ankaŭ en pluraj aliaj urboj, ĉiam ludante verkojn de grandaj komponistoj, kaj aldone siajn. Tiu turneo daŭris ĝis la komenco de la sekvanta jaro. En la urbo, San-Paŭlo liaj admirantoj kuniĝis kaj donacis al li horizontalan italan pianon. En la tago de la transdono, la fama verkisto Mário de Andrade, faris prelegon pri la verkoj de Nazareth, en la "Sociedade de Cultura Artística de São Paulo". La piano nun apartenas al la "Museu da Imagem e do Som" en Rio-de-Ĵanejro.

En la fino de januaro 1927 Ernesto revenas al Rio kaj komencis senti la unuajn signalojn pri surdeco. En 1929 nova malfeliĉa momento: la Morto de lia edzino. Tiu malĝojo komencis minaci lian mensan staton. En 1930 li registris por la tre fama diskregistrejo "*Odeon*" du el siaj verkoj, "*Escovado*" kaj "*Apanhei-te, cavaquinho*" En 1932 li vojaĝis al la sudo de Brazilo por fari plurajn prezentadojn. En tiu tempo li ludis iom klinite maldesktren, eble pro la surdeco, kiu iom post iom plifortiĝis. Ankaŭ lia menso prezentiĝis tre malforta. En la fino de 1932 li eniris en la Instituto de "*Neu-rosífilis da Praia Vermelha*". Iom

poste li estis sendita definitive la "*Colônia Juliano Moreira*", en Jacarepaguá. Lia lasta verko laŭdire, estis kreita tie; ĝia nomo: *"Estás maluco outra vez"*. Ernesto Júlio Nazareth,

al vojaĝis al la Spirita Mondo, la unuan de februaro 1934.

Aŭdado de "*Fon-Fon*", Artur Moreira Lima.

Dankon!

Por Kultura Kooperativo de Esperantistoj

Tre ame.

Alfredo Aragón

Verkoj De Ernesto Nazareth

(alfabete).

- A Bella Melusina
- A Flor de meus Sonhos
- A Florista
- A Fonte do Lambari
- A Fonte do Suspiro
- Adieu
- Adorável
- Ai Rica Prima
- Albíngia
- Alerta!
- Ameno Resedá
- Andante Expressivo
- Apanhei-te cavaquinho
- Arreliado
- Arrojado
- Arrufos
- As Gracinhas de Nhô-nhô
- Até que enfim!
- Atlântico
- Atrevidinha
- Atrevido
- Bambino
- Bambino- Você não me dá! Com letra de Catullo da Paixão Cearense
- Batuque
- Beija Flor com letra de Ernesto Nazareth
- Beija-Flor
- Beijinho de Moça
- Bom-Bom
- Brejeira
- Brejeiro
- Byciclette-Club
- Caçadora
- Cacique
- Capricho
- Cardosina
- Carioca
- Catrapuz
- Cavaquinho, Por que Choras? (incluindo uma cópia do manuscrito)
- Celestial
- Chave de Ouro
- Chile-Brazil
- Comigo É na Madeira
- Confidências
- Coração que sente
- Corbeille de Fleurs
- Correcta
- Crê e Espera
- Crises em Penca
- Cruz, Perigo!!
- Cruzeiro
- Cubanos
- Cuéra
- Cutuba
- Cuyubinha
- De Tarde
- Delightfulness
- Dengoso (atribuída a Nazareth)
- Desengonçado
- Digo
- Dirce
- Divina
- Dor Secreta
- Dora
- Duvidoso
- Elegantíssima
- Elegia para piano (mão esquerda)
- Elétrica
- Elite-Club
- Encantada
- Encantador
- Ensimesmado
- Eponina
- Escorregando
- Escovado
- Espalhafatoso
- Espanholita
- Está chumbado
- Eulina
- Expansiva
- Êxtase (canto, piano e violino)
- Êxtase (piano)
- Exuberante
- Faceira
- Famoso
- Fantástica
- Favorito
- Feitiço
- Ferramenta
- Fetiço não Mata
- Fidalga
- Floraux
- Fon-fon
- Fora dos Eixos
- Furinga
- Garoto
- Gaúcho
- Gemendo, Rindo e Pulando

- Genial
- Gentes, o Imposto Pegou?
- Gentil
- Gotas de ouro
- Gracietta
- Guerreiro
- Helena
- Henriette
- Hino a Alaor Prata
- Hino a Carneiro Leão
- Hino a Pereira Passos
- Hino da Escola Ester Pedreira de Mello
- Hino da Escola Floriano Peixoto
- Hino da Escola Pedro II
- Ideal
- If I Am Not Mistaken
- Improviso (Estudo de Concerto)
- Insuperável
- Ipanema
- Iris
- Jacaré
- Jangadeiro
- Janota
- Julieta (quadrilha)
- Julieta (valsa)
- Julita
- Labirinto
- Laço Azul
- Lamentos
- Magnífico
- Mágoas
- Maly
- Mandinga
- Marcha Fúnebre
- Marcha Heróica aos Dezoito do Forte
- Mariazinha Sentada na Pedra
- Marietta
- Matuto
- Meigo
- Menino de ouro
- Mercedes
- Mesquitinha
- Myosótis
- Não Caio n'Outra!!
- Não me Fujas Assim
- Nazareth
- Nenê
- Nenê - Sertaneja com letra de Catullo da Paixão Cearense
- No Jardim
- Noêmia
- Noturno
- Nove de Julho
- Nove de Maio
- O Alvorecer
- O Futurista
- O nome Dela (polca)
- O Nome dela (valsa)
- O que Há
- O Teus Olhos Cativam
- Odeon
- Onze de Maio
- Orminda
- Ouro Sobre Azul
- Pairando
- Paraíso
- Paraíso
- Pássaros em Festa
- Paulicéa como És Formosa!
- Perigoso
- Pierrot
- Pingüim
- Pipoca
- Pirilampo
- Plangente
- Plus Ultra
- Podia ser Pior
- Polca para a Mão Esquerda
- Polonaise
- Por que Sofre? (tentar conseguir uma cópia melhor)
- Primorosa
- Proeminente
- Quebra-Cabeças
- Quebradinha
- Ramirinho
- Ranzinza
- Rayon d'Or
- Reboliço
- Recordações do Passado
- Remando
- Resignação
- Respingando
- Ressaca
- Retumbante
- Rosa Maria
- Sagaz
- Salve, Salve, Nações Unidas
- Sarambeque
- Saudade
- Saudade dos Pagos
- Saudades e Saudades!
- Segredo

- Segredos da Infância
- Sentimentos d'Alma
- Soberano
- Suculento
- Sustenta a ...nota...
- Sutil
- Talismã
- Tenebroso
- Thierry
- Topázio Líquido
- Travesso
- Tudo Sobe...
- Tupinambá
- Turbilhão de Beijos
- Turuna
- Vem Cá, Branquinha
- Vésper
- Victória
- Vitorioso
- Você bem Sabe
- Xangô
- Yolanda
- Zênite (autoria de Maestro Gaó)
- Zica
- Zizinha